

Aperas 6-foje jare. Jarabono 56 steloj, 14 ned. gld., 5,50 us.dol., 85 jug.din.

(DUOBLA) FILOLOGIA NUMERO 6/7

-KUNREDAKTITA DE S. ĜUĜEV-

LA ENHAVO:

- W.A.V.Themaat: La vicordo de la frazelementoj en Esperanto
 R.P.Noguera: La fleksia sistemo de Esperanto
 H.Seppik: Propraj nomoj en Esperanto
 G.B.Gregor: La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto
 H.Bakker: Testo pri Esperanto-lingvoscio
 F.Garcia Blázquez: Adverboj kaj pseŭdoadverboj

LA VICORDO DE LA FRAZELEMENTOJ EN ESPERANTO

(W.A.V.THEMAAT, AMSTERDAM, NEDERLANDO)

1) LA TEMO DE LA ARTIKOLO

La regularo por la vicordo de la vortoj en frazo konsistas el tri partoj:

- 1) La reguloj por la vicordo de la frazelementoj;
- 2) La reguloj por la vicordo de la vortoj en unu frazelemento;
- 3) La reguloj por malkontinuaĵoj, t.e. disigoj de vortoj apartenantaj al la sama frazelemento fare de vortoj ne apartenantaj al ĝi.

La "libereco de vortordo" en Esperanto estas ĉefe libereco de la vicordo de la frazelementoj (pro la akuzativo). Esperanto havas nur tre limigitan liberecon de vortordo interne de frazelemento, kaj ĝenerale ne multe pli da malkontinuaĵoj ol la lingvoj angla kaj franca. Tial la plej alloga temo estis, kiuj faktoroj influas la vicordon de la frazelementoj.

La ekzisto de malkontinuaĵoj necesigas nur difini kion konsideri kiel la lokon de malkontinua frazelemento rilate al aliaj frazelementoj. Kiel tian mi konsideras la lokon de la lasta vorto, ĉar la malkontinuecon kaŭzas ofte la emo meti longajn frazelementojn en la finon de la frazo.

Mi distingas la jenajn frazelementojn: subjekton, predikaton, rektan objekton, prepozician objekton, objektan predikativon, agenton en pasivaj frazoj, adjektojn kaj alparolatan personon.

La adjektoj estas tre heterogena grupo; tial mi dividas ilin en 9 sub-klasojn; adjektojn subjektajn statajn, objektajn statajn, manierajn, gradajn, instrumentajn, celajn, modalajn, lokajn, tempajn, koncernajn, verovalorajn kaj pseŭdo-subpropoziciojn.

La klason el la 16 menciitaj klasoj (subjekto, predikato, rekta objekto, prepozicia objekto, objekta predikativo, agento, alparolata persono kaj la 9 subklasoj de adjektoj) al kiuj apartenas donita frazelemento en donita frazo mi nomas ĝia frazofunkcio.

II) FAKTOROJ INFLUANTAJ LA VICORDON DE LA FRAZELEMENTOJ

Laŭ la indikoj de pluraj publikigoj pri la vortordo en naturaj lingvoj, precipe tiuj kun libera vortordo, mi esploris la influon de la jenaj faktoroj je la loko de la frazelementoj:

- 1) La frazofunkcio;
- 2) La longo de la frazelementoj. Laŭ multaj aŭtoroj ekzistas ĝenerala emo, statistike pruvita, meti longajn frazelementojn en la finon de la frazo. Sed mi ricevis la impreson, ke komencaj frazelementoj estas ankaŭ iom pli longaj ol mezaj (=nek komencaj, nek finaj). Tial mi determinis la mezajn vortnombrojn de la komencaj, mezaj kaj finaj frazelementoj en la esploritaj tekstoj.

- 3) La tielnomata komplekseco.

La frazelementojn mi distingis en:

- a) Substantivajn kun substantivoj aŭ substantivigitaj adjektivoj kiel kernoj (eventuale antaŭataj de artikoloj aŭ adjektivaj pronomoj), kiujn povas antaŭi prepozicioj. La kerno de substantiva frazelemento estas la substantivo (aŭ substantivigita adjektivo), rilate al kiu ĉiuj eventualaj aliaj substantivoj estas determinantoj;
- b) Adverbaj participoj kun eventualaj suplementoj;
- c) Substantivigitaj infinitivoj kun eventualaj suplementoj kaj kiujn povas antaŭi prepozicio. Ili plenumas la funkcion de ĉiuj frazelementoj krom verbaj predikatoj;
- ĉ) Subpropozicioj;
- d) Partiklaj, ĉiuj aliaj.

La kompleksecon mi atentus parte pro ĝia sendependa influo (infinitivoj kaj subpropozicioj staras prefere frazfine, kaj, se ne frazfine, prefere komence).

4) La tiel nomata determiniteco. La teoria bazo estas la tielnomata Funkcia Frazo Perspektivo de Firbas. "La Funkcia Frazo Perspektivo, kiu kaŭzas, ke la frazo komenciĝas per elementoj temaj kaj finiĝas per remaj." (Svartvik, p. 166). Tre globale, "temaj elementoj estas tiuj, kiuj esprimas faktojn konatajn el la kunteksto vorta aŭ situacia, dum remaj elementoj estas tiuj kiuj esprimas faktojn novajn, nekonatajn." El la nomaj frazelementoj (frazelementoj, kiuj, - post forigo de eventuala komenca prepozicio kaj/aŭ kopulo, kaj eventuala akuzativa n povas plenumi la funkcion de subjekto), propraj nomoj, substantivoj kun artikolo aŭ pronomoj posedaj, montraĵaj, reflektivaj, relativaj subpropozicioj kaj personaj kaj montraĵaj pronomoj estas determinitaj; substantivoj sen artikoloj, kun numeraloj aŭ nedeterminitaj pronomoj estas nedeterminitaj.

La korelativaro sugestas, ke tiu distingo estas aplikebla ne nur al substantivoj kaj pronomoj, sed ankaŭ al adverboj. Tio estas vera, sed oni atentus tro ekskluzive la morfologion de Esperanto, se oni kalkulus nur tabelajn vortojn komenciĝantajn per t kaj iliajn kunmetaĵojn kiel determinitajn. Esenca por determinitaj adverboj estas montra karaktero. Kompleta elnomado de ĉiuj determinitaj adverboj estus tro ampleksa.

Sed la du valoroj "determinita" kaj "nedeterminita" ne sufiĉas, se ni volas apliki la kategorion de la determiniteco al ĉiuj frazelementoj. Tial mi distingas la frazelementojn jene

Relativa

Demanda

Determinita

Ĝenerala (=kolektiva aŭ negativa)

Adjektiva

Nedeterminita

Verba

Subpropozicio

Adjektivaj frazelementoj estas ĉiuj neverbaj frazelementoj ne apartenantaj al la aliaj kategorioj.

5) La voĉo de la predikato. Ĝi ne influas la vortordon senpere, sed interligo inter la oftecoj de la voĉoj de la verbo kaj la oftecoj de la pozicioj de la objekto rilate al subjekto kaj predikato ŝajnas apriorie probabla.

En lingvo kiel la angla, kiu havas pasivon, sed akuzativon nur por personaj pronomoj kaj en kiu tial inversio de la rekta objekto estas preskaŭ nebla,

la pasivo estas ofte uzata por meti la logikan objekton (la frazelementon kiu estas objekto en la responda aktiva frazo) en la komencon de la frazo, aŭ la logikan subjekton malantaŭ la predikaton.

Aliflanke, en lingvo kiel la hungara, kun tre regule uzata akuzativo kaj tre malofte uzata agpasivo, se oni sentas similan emon meti la logikan subjekton malantaŭ la predikaton aŭ la logikan objekton antaŭ la predikaton, oni simple ŝanĝas la vortordon kaj konservas la aktivon. Ekz. mi iam aŭdis de hungara turistgvidisto la frazon: *La lagon nutras du fontoj.* La parolsituacio ekskludis la intencan serĉon de stilefikoj: E. Sonnenfeld, kiu bone konas la hungaran lingvon, konfirmis al mi en letero, ke tiu frazo estas tute konforma al la kutimoj de la hungara lingvo mem. La plej bona angla traduko de tiu frazo estas: "The lake is nourished by two sources."

Do inversio de la objekto kaj pasivo, precipe kun indikita agento, estas almenaŭ en kelkaj kazoj alternativaj rimedoj por la sama celo. Tio faras esplorindaj tri aferojn:

- a) La oftecon de la pozicio de la agento antaŭ aŭ inter subjekto kaj predikato kompare kun la sama ofteco por aliaj frazofunkcioj; ĝi estas tre malalta - kaj tial la agento preskaŭ ĉiam staras malantaŭ subjekto kaj predikato, kio konfirmas la hipotezon, ke la pasivo kun indikita agento servas preskaŭ ĉiam por kvazaŭ-inversio;
- b) La oftecojn de la pozicio de la objekto malantaŭ la subjekto kaj predikato, pasivo kaj pasivo kun indikita agento en diversaj tekstoj; se la pasivo servas parte por kvazaŭ-inversio, oni devus atendi, ke ĝenerale tekstoj havas ju pli grandajn oftecojn de la pasivo kaj de la pasivo kun agento, des malpli oftajn inversiojn de la objekto ili havas.
- c) Se la pasivo sen indikita agento ankaŭ parte servus por ŝanĝi la vortordon (inter la predikato kaj la logika objekto), oni devus atendi, ke la subjekto staras pli ofte antaŭ la predikato en pasivaj frazoj ol en aktivaj. Tial mi determinas la oftecojn de la pozicioj de la predikato antaŭ aŭ malantaŭ la subjekto aparte por ĉiu voĉo.

Mi distingas kvar voĉojn: netransitivan, transitivan aktivan, pasivan kaj medialan. Ĉar por netransitivaj verboj la aktiva voĉo ne kontrastas kun ebla pasiva aŭ mediala voĉo, mi konsideras la netransitivecon kiel apartan voĉon.

6) La versformo; por kontentigi rimon kaj metrikon en poezio oni pli emas devii de la ordinara vortordo ol en prozo.

7) Tre grava faktoro influanta la vortordon estas ankaŭ la frazakcento. Sed ĉar la akcento ne estas indikita en ordinaraj presitaj tekstoj, la esploro de la influo de la frazakcento je la vortordo postulus tute novajn observojn kaj tial ĉi tie mi ĝin ne esploros.

III) LA PLANO DE LA ESPLORO: LA ELEKTO DE LA STILTRAJTOJ ES- PLORENDAJ

Ĉi tiu studo esploras statistikajn stiltraĵojn en Esperantaj tekstoj. Do la plano de la esploro konsistas el du partoj: la elekto de la traĵtoj esplorendaj kaj la elekto de la tekstoj esplorendaj.

Por povi juĝi, ĉu certa ofteco de certa traĵto T de la vicordo de la frazelementoj en teksto esplorata montras emon de la aŭtoro al ĝi aŭ ĝuste malemon, oni devas kompari ĝin kun la ŝanca ofteco.

Esenca por la strukturo de la frazo estas la distingo de kvar specoj de frazofunkcioj: la predikato, la argumentoj, la adjektoj kaj la alparolata persono. Iliaj malsamaj roloj reflektiĝas en la ordinara vortordo, kaj nur surbaze de kompreno de iliaj sintaksaj kaj semantikaj rilatoj oni povas determini, kiuj parametroj estas plej gravaj por la vortordo.

Ĉar indikativaj frazoj estas plej facile logike analizeblaj kaj plej oftaj en la pli multaj tekstoj, en la sekvontaj alineoj mi limigos min al indikativaj frazoj, sed multo aplikiĝas ankaŭ al demandoj kaj ordonoj.

La predikato estas la akso de la tuta frazo. Indikativa frazo havas verovaloron, kaj por havi verovaloron ĝi devas havi predikaton. En senpersona frazo la predikato sole sufiĉas por doni al la frazo verovaloron, sed alparolata persono ne havas verovaloron, kaj subjekto, objekto aŭ adjekto sola ne havas verovaloron. Se ili sole funkcias kiel frazoj kun verovaloro, la predikato ĉiam estas plenigenda el la kunteksto vorta aŭ situacia.

La terminon argumento mi pruntis el la simbola logiko. Se oni tradukas frazon en simbolan logikon, la subjekto, objekto kaj objekta predikativo iĝas argumentoj de la predikato. La agento en pasivaj frazoj estas konsiderata kiel ar-

gumento, ĉar ĝi estas la subjekto de la respondanta aktiva frazo. La predikato kun la argumentoj estas nomata la frazkerno.

Tute alie kondukas la adjektoj. Inter si ili estas tre malsimilaj sintakse kaj semantike. Ekzakta bazigo de la klasifo de la adjektoj ne taŭgas en la kadro de ĉi tiu koncizigita artikolo; ĝi estas trovebla en la kompleta artikolo. Fakte klariganta multajn el la rezultoj estas, ke modala adjekto estas analizebla logike kiel predikato, kies argumento estas la frazkerno: eble li venos = estas eble, ke li venos.

Koncernaj adjektoj indikas, ke la ago menciita en la frazkerno koncernas la aferon menciitan en la adjekto, ekz.

Mi helpas vin en via studo

estas sinonima al

Mia helpo al vi koncernas vian studon.

De la verovaloraj adjektoj la plej tipaj reprezentantoj estas subpropozicioj. Se la adjekto estas subpropozicio la frazo havas la formon

Sj Sp Ĉp,

en kiu Sj estas subjunkcio, Sp la subpropozicio sen la subjunkcio kaj Ĉp la ĉefpropozicio. Verovaloraj adjektoj estas kondiĉaj, kaŭzaj, koncedaj kaj sendependecaj subpropozicioj.

La pseŭdo-subpropozicioj

Ĉp kio Sp

estas parafrazeblaj kiel

Sp Sp (Ĉp), ekz.

Li estis ebria, kio okazis ofte

estas sinonima al

Li estis ebria kaj ke li estis ebria, okazis ofte

Ĉiaj adjektoj, krom adjektoj manieraj kaj gradaj, estas malpli strikte ligitaj al la predikato ol la argumentoj, kio reflektiĝas en ilia pli granda distanco al la predikato. Ekzistas forta tendenco meti la predikaton kaj la argumentojn kune en unu vicon (la blokon), strikte difinitan kiel la vicon de la predikato kaj la argumentoj kun la adjektoj kaj alparolata persono inter ili, kaj la adjektojn kaj alparolatan personon aŭ antaŭ aŭ malantaŭ la blokon.

Almenaŭ, tio estas la difino de bloko sur kiu mi bazigis mian komputilpro-

gramon. La rezultoj de mia esploro montris, ke inkluzivigo de la adjektoj manieraj kaj gradaj en la blokon laŭ difino donintus pli bonan organizon de la faktoj.

Fine plej malstrikte ligita al la predikato estas la alparolata persono, ĉar en indikativa frazo ĝi ne influas la verovaloron, krom se tiu frazo entenas duapersonan pronomon aŭ kunmetaĵon de ĝi. Oni povus supozi, ke tiu malstrikta ligo al la predikato reflektiĝas en granda distanco al ĝi, do pozicio aŭ frazkomenca aŭ frazfina, plej ofte ankaŭ antaŭ la adjektoj (en la komenco de la frazo) aŭ malantaŭ la adjektoj (en la fino de la frazo).

(1) Do la programo por la determino de la statistikaj ecoj de la vicordo de la frazelementoj (kiom depende nur je la frazofunkcio) estas:

1.1.- Kiel mi jam diris, la predikato okupas centran pozicion en la frazo. Sed la subjekto okupas unikan pozicion inter la argumentoj, ĉar ĝi estas la ununura argumento kutime staranta antaŭ la predikato. Do mi determinis la pozicion rilate al la subjekto S kaj la predikato P: "antaŭ", "inter" aŭ "post", la tielnomatan ĉefan pozicion por ĉiuj frazelementoj.

Se la frazo havas S kaj P, por ĉiu alia frazelemento "antaŭ" signifas "antaŭ S kaj P" kaj "post" "post S kaj P".

Por S kaj P mem "antaŭ" resp. "post" signifas "antaŭ" resp. "post" la alia.

Se la frazo havas nur unu U el S kaj P, "antaŭ" resp. "post" signifas "antaŭ" resp. "post" U.

Por ĉiu frazofunkcio mi kalkulis ankaŭ.

la nombron da frazelementoj de tiu frazofunkcio en tiu pozicio
la totala nombro da frazelementoj de tiu frazofunkcio

Ĉar en multaj tekstoj preskaŭ nur partiklaj frazelementoj estas metataj inter subjekton kaj predikaton, mi determinis la nombron da partiklaj frazelementoj inter subjekto kaj predikato por ĉiuj frazofunkcioj.

Krome mi kalkulis la relativajn vicordojn de ĉiuj paroj de argumentoj en la kazo, ke ambaŭ staras malantaŭ la predikato.

1.2.- La verajn kaj ŝancajn nombrojn de adjektoj kun ĉiu komplekseco kaj ĉiu frazofunkcio antaŭ la bloko, en la bloko kaj malantaŭ la bloko mi devis determini.

La verajn kaj ŝancajn nombrojn da partiklaj adjektoj de ĉiu frazofunkcio en

certa pozicio en la bloko mi devis determini: tuj antaŭ la predikato, tuj malantaŭ la predikato aŭ en aliaj pozicioj.

1.3.- La veraj kaj ŝancaj nombroj da alparolataj personoj en pozicio ekstrema (frazkomenca kaj fraz fina) sub la kondiĉo de la donitaj longoj de la serioj de frazelementoj antaŭ kaj malantaŭ la bloko.

1.4.- La nombro da alparolataj personoj montriĝis esti tro malgranda en korpusoj ne speciale elektitaj por tiu celo; en IV) mi traktos, per kiuj korpusoj mi esploris la pozicion de la alparolataj personoj.

1.5.- La veraj kaj ŝancaj nombroj da frazelementoj de donita frazofunkcio en komenca kaj fina pozicio.

(2) La influon de la versformo mi esploris kompreneble nur por la poeziaj tekstoj. Ni vidos, ke en poezio la ofteco de la devioj de la ordinara vortordo (inversioj) estas pli granda ol en prozo. Estas esplorende por poeziaj tekstoj, kiom tion kaŭzas la versformo, do en kiom da kazoj la poeto estis devigita inversii por kontentigi rimon kaj metrikon. Tion mi esploris nur por la ĉefa pozicio. La adjektoj konsiderataj kiel unu grupo kaj la alparolata persono ne havas ordinaran ĉefan pozicion (kiel ni vidos, ili staras preskaŭ same ofte antaŭ kiel malantaŭ la bloko), do rilate al ili oni ne povas paroli pri inversio. Inter la predikato kaj la argumentoj nur la subjekto havas la ordinaran ĉefan pozicion "antaŭ", ĉiuj aliaj havas la ordinaran ĉefan pozicion "post". Krome la ĉefa pozicio de la subjekto estas la spegulimago de tiu de la predikato: se la predikato havas la ĉefan pozicion "antaŭ", la subjekto havas la ĉefan pozicion "post" kaj inverse; do ni povas kontentigi nin per la kalkulado de la nombroj kaj oftecoj de la ĉefaj pozicioj de la predikato kaj ĉiuj argumentoj krom la subjekto. Tiam ĉiuj konsiderataj frazofunkcioj havas la ordinaran ĉefan pozicion post; frazelementoj apartenantaj al ili estas inversiitaj, se ili havas la pozicion antaŭ aŭ inter. Do por ĉiu el la menciitaj frazofunkcioj kaj ĉiu inversiita ĉefa pozicio mi kalkulis, en kiom da kazoj post la elimino de la inversio rimo kaj/aŭ metriko estas ne plu kontentigitaj (mi nomis tiujn kazojn "pro la versformo").

(3) Por esplori la interligon inter la ofteco de la pasivo, precipe la pasivo kun indikita agento, kaj la ofteco de la inversio de la objekto, kaj por esplori, kiom la pasivo estas uzata por ŝanĝi la vicordon de logika subjekto, predikato kaj

logika objekto mi determinis:

3.1.- La oftecon de la agentoj $\left(\frac{\text{nombro da agentoj}}{\text{nombro da predikatoj}}\right)$;

3.2.- La oftecojn de pasivoj kaj medialoj por finitaj verboj, participoj kaj infektivoj

$\left(\frac{\text{nombro da pasivoj}}{\text{nombro da aktivoj}}\right)$ kaj $\left(\frac{\text{nombro da medialoj}}{\text{nombro da aktivoj}}\right)$;

3.3.- La oftecojn de la ĉefaj pozicioj de predikatoj de donita voĉo.

(4) Por determini la influon de la longo de la frazelementoj je ilia vicordo mi determinis:

Por la komencaj, mezaj kaj finaj frazelementoj la nombron da vortoj, la nombron da frazelementoj kaj la mezan nombron da vortoj

$\left(\frac{\text{nombron da vortoj}}{\text{nombro da frazelementoj}}\right)$.

Mi kalkulis ĉiun el tiuj nombroj por ĉiu komplekseco.

(5) Por determini la influon de la komplekseco je la vortordo mi kalkulis la veran kaj ŝancan nombrojn da frazelementoj komencaj, mezaj kaj finaj por ĉiu komplekseco.

(6) Por determini la influon de la determiniteco je la vortordo mi kalkulis:

6.1.- La nombrojn da relativaj kaj demandaj frazelementoj de ĉiu frazofunkcio: la totalan nombron kaj la nombron de tiaj frazelementoj en komenca pozicio (ĉefe por scii, kiun porcion de la inversioj de frazelementoj de frazofunkcio kutime malantaŭ la predikato kaŭzas ilia relativeco aŭ demandeco);

6.2.- La nombron da frazelementoj kun tiu determiniteco (nomatan determinnombro), la sumon de iliaj pozicioj en la frazo (por ĉiu frazelemento ĝi estas

$\frac{\text{ĝia vicnombro en la frazo} - 1}{\text{la totala nombro da frazelementoj en tiu frazo} - 1}$, nomatan determinloko; por frazoj de nur unu frazelemento ĝi estas 0.5) kaj la mezan pozicion en la frazo

$\left(\frac{\text{la sumo de iliaj frazopozicioj}}{\text{la nombro da tiaj frazelementoj}}\right)$, nomatan determinmezo). Ĉiun el tiuj nombroj

mi kalkulis aparte por la partiklaj kaj la nepartiklaj frazelementoj.

6.3.- Laŭ Grappin (p.294) en la pola lingvo nenio, ĉio, neniam, ĉiam kaj tro staras preskaŭ ĉiam en la komenco de la frazo pro sia forta akcento. Do mi kalkulis la verajn kaj ŝancajn nombrojn da kolektivaj kaj neaj frazelementoj en la komenco kaj en la fino de la frazo.

IV) LA PLANO DE LA ESPLORO; LA ELEKTO DE LA TEKSTOJ

Kutimoj koncerne la vortordon, kiom ne determinitaj de striktaj gramatikaj reguloj, estas stiltraĵoj. La stilon de teksto influas parte la gepatra lingvo de la aŭtoro, parte la tekstgenro. Sed ĉe grandaj stilistoj la influo de la gepatra lingvo ofte tute cedas al konsciaj stilidealoj. Ekzemple en la epopeo "La infana raso" de Auld (gepatra lingvo: la angla) la ofteco de la pozicio de la objekto antaŭ la subjekto kaj predikato (27.5%) estas pli granda ol en "Hungara vivo" (16%) malgraŭ la fakto, ke en la angla lingvo inversio de la objekto estas maloftega kaj en la hungara lingvo sufiĉe ofta.

Do por havi superrigardon pri la eblaj Esperantaj stiloj mi devis esplori unue tekstojn, kies stilon influas unue la gepatra lingvo de la aŭtoro kaj due tekstojn, kies stilon forte influas la tekstogenro aŭ en kiu la influo de la gepatra lingvo eĉ tute cedas.

Por la unua celo mi uzis revuojn de naciaj Esperanto-organizaĵoj, kompreneble forlasante la kontribuaĵojn de fremduloj kaj la poemojn pro ilia tre devianta stilo (krom por "Hungara vivo", por kiu mi notis la dezirindecon de tio nur tro malfrue).

Preciza klarigo de miaj motivoj por la elekto de la tekstoj postulus tro multan spacon, sed la sperto montras, ke la gepatra lingvo influas relative mal multe la ordinaran vortordon (ni ne trovas ekzemple la japanan dominantan vortordon subjekto - objekto - predikato kiel dominantan vortordon en la publikaĵoj de japanaj esperantistoj). Influas la gepatra lingvo ĉefe la oftecon de la devioj de la ordinara vortordo. Do la plej grava distingo por la naciaj lingvoj estas tiu inter la lingvoj ĉiam distingantaj la frazofunkciojn per morfologiaj distingiloj kaj ĉiam havantaj liberecon en ilia lokigo unuflanke kaj la lingvoj malriĉaj je morfologiaj distingiloj por la frazofunkcioj kaj do kun ligita vortordo aliflanke.

Por la revuoj mi elektis la lingvojn ĥinan (la prototipon de izola lingvo) kaj anglan (la plej analizan de la Eŭropaj hindeŭropaj lingvoj) kiel reprezentantojn de analizaj gepatraj lingvoj kun ligita vortordo kaj kiel reprezentantojn de sintezaj gepatraj lingvoj kun libera vortordo la polan kaj hungaran. Certan

rolon en la elekto de la revuoj ludis ankaŭ la disponebleco de bonaj Esperanto-revuoj. Koncerne la distingon inter subjekto kaj objekto idealan ekzemplon de lingvo kun libera vortordo indikanta ilian funkcion per apartaj morfemoj prezentas la hungara, kiu indikas la rektan objekton per unu ĉiam sama sufikso t, sur kelkfoje ligata al la radiko per ligvokalo e; ankaŭ la preskaŭa manko de pasivo favoras la inversion, dum en ĉiuj slavaj lingvoj pro la pluraj deklinaciaj klasoj ĉe multaj substantivoj nominativo kaj akuzativo koincidas. Sed alirilate la pola lingvo distingas la frazofunkciojn pli bone ol la hungara. Estas do bone havi ambaŭ kiel ekzemplojn de sintezaj lingvoj kun vortordo relative libera. La lokfirmeco de la rekta objekto montriĝis en "Hungara vivo" (0.78) eĉ iom pli granda ol en "Pola Esperantisto" (0.77), kvankam ne signife. Do ŝajnis al mi superflua esplori, ĉu ne ekzistas popoloj, kiuj en Esperanto emas pli al varia vortordo ol la poloj kaj hungaroj.

Kiel tekstgenrojn mi esploris: poezio - noveloj - paroladoj - scienco - revuoj. Krom ĉe la paroladoj, el kiuj mi esploris Lapenna-n antaŭ fiksi ĉi tiun planon, mi esploris en ĉiu tekstgenro ĉiam unue tekston de aŭtoro kun gepatra lingvo kun relative mallibera vortordo. Se tiu aŭtoro montriĝis uzi jam tre liberan vortordon (ekz. Auld en "La infana raso"), mi juĝis superflua esplori, ĉu tian liberecon uzas ne ankaŭ aŭtoroj al kutimiĝintaj al tiu libereco jam pro sia gepatra lingvo, sed preferis esplori per teksto de alia aŭtoro kun mallibera vortordo en sia gepatra lingvo, ĉu ne temas pri stilo tute persona. Male, se la aŭtoro montriĝis uzi relative malliberan vortordon, almenaŭ malpli grandan oftecon de devioj de la normala vortordo ol en "Hungara vivo" kaj "Pola Esperantisto", mi esploris por kontrasto tekston de aŭtoro kun gepatra lingvo kun libera vortordo.

Tiel mi atingis la jenan tekstaron; antaŭ ĉiu mi mencios la mallongigon, per kiu mi ĝin indikos en la sekvo, kaj la gepatran lingvon de la aŭtoro.

Poezio:

V1: angla: W.Auld, La infana raso

V2: angla: M.Boulton, Eroj, p. 1-112

Noveloj:

N1: angla: M.Boulton, Okuloj kaj Ebrivirgeco (El Okuloj)

N2: hungara: F.Szilagyi, La liberiĝo de la juĝisto kaj Nila

Paroladoj:

P1: franca: E.Privat, Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado
(ne sufiĉe longa, ĉ. 2000 vortoj)

P2: serbokroata: I.Lapenna, Jaro de internacia kunlaboro (El Elektitaj paroladoj kaj prelegoj)

Scienco:

S1: franca: G.Waringhien, Historia skizo de la esperanta movado
(El Lingvo kaj vivo)

S2: pola: A.Gula, Elementaj Korpuskloj kaj la Strukturo de Materio (El La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj, ĉ. 6000 vortoj)

Revuoj:

R1: ĥina: El Popola Ĥinio, 1964/4

R2: angla: The British Esperantist, januaro kaj februaro 1966

R3: pola: Pola Esperantisto, 1968, 1/2, p. 1-19

R4: hungara: Hungara vivo, 1961/1

Por la esploro de la alparolata persono mi esploris tekstojn konsistantajn el ĉiuj frazoj entenantaj alparolatajn personojn el multe pli ampleksaj tekstoj, nome:

P2v: I.Lapenna, Elektitaj paroladoj kaj prelegoj

S1v: G.Waringhien, Lingvo kaj vivo

R2v: The British Esperantist, 1966, 1967, 1968

R4v: Hungara vivo, 1961: 1,2; 1964: 1; 1971: 1

V) KONKLUDOJ

5.1. La influo de la komplekseco

La efektivigo de la komputilprogramo donis amason da rezultoj, per kiuj mi ne tedos miajn legontojn.

La kompleksecon mi pritraktos unue, ĉar pri la influo de la komplekseco mi faris apartan statistikon kaj en multaj statistikoj pri la influo de la frazofunkcio, la voĉo, la longo kaj la determiniteco mi atentis ankaŭ la kompleksecon. Do se

mi unne esploras la influon de la komplekseco sole, poste mi komprenos pli facile, kio en la trovitaj tendencoj estas atribuenda al la komplekseco kaj kio al la frazofunkcio, la voĉo, la longo kaj la determiniteco.

La partiklaj frazelementoj staras pli ofte ol laŭŝance frazmeze kaj malpli ofte ol laŭŝance frazfine; la substantivaj, participaj kaj infinitivaj frazelementoj kaj la subpropozicioj staras malpli ofte ol laŭŝance frazmeze kaj pli ol laŭŝance frazfine. Nur la infinitivaj frazelementoj staras malpli ofte ol laŭŝance frazkomence en ĉiuj tekstoj; frazelementoj de ĉiuj aliaj kompleksecoj staras en kelkaj tekstoj pli ol laŭŝance frazkomence, en aliaj malpli ol laŭŝance.

La veran nombron da frazoj kun certa stiltraĵo

La ŝanca nombro da frazoj kun certa stiltraĵo

mi nomas ĝia verŝajneco.

Plej malverŝajna la meza pozicio estas por la subpropozicioj. Tiu verŝajneco estas en neniu el la esploritaj tekstoj pli granda ol 0.13.

5.2. Influo de la frazofunkcio kaj de la versoformo

La ordinara ĉefa pozicio de la argumentoj estas malmulte surpriza. En ĉiuj esploritaj tekstoj la predikato staras plej ofte malantaŭ la subjekto kaj ĉiuj argumentoj krom la subjekto (kaj krom la agentoj en tekstoj sen agentoj; estas signife, ke inter la 12 tekstoj estas ne malpli ol 5 (V1, V2, N1, N2 kaj P1) sen agentoj, staras en la plimulto de la frazoj malantaŭ subjekto kaj predikato. Frazelementon "antaŭ" laŭ la difino de III mi nomas antaŭa; frazelementon "post" mi nomas posta. La nombrojn da antaŭaj kaj postaj adjektoj kaj alparolataj personoj ni ne analizos detale, ĉar tiujn frazofunkciojn ni pritraktos surbaze de faktoj multe pli relevantaj.

La devioj de la ordinara loko. La lokfirmecon de certa frazofunkcio en certa teksto mi difinas kiel la oftecon de la dominanta ĉefa pozicio. La plej lokfirma argumento estas la agento. En ĉiuj esploritaj tekstoj mi trovis nur unu agenton en alia pozicio ol malantaŭ subjekto kaj predikato: Estas organizitaj de ili amatoraj teatraj, muzikaj kaj sportaj grupoj (R1, p. 183).

Tio konfirmas la hipotezon, ke la pasivo kun agento estas preskaŭ ĉiam uzata por atingi certan vicordon inter logika subjekto, predikato kaj logika objekto.

Pro la unikeco de la kazo estas sensece serĉi kaŭzon, kial tiu devio okazis ĝuste en "El Popola Ĥinio".

Krom la agento la plej lokfirma frazofunkcio estas la objekta predikativo. Nur en unu teksto (R1, kun unu devio por la agento kaj neniu devio por la objekta predikativo) la objekta predikativo estas pli lokfirma ol la agento. La vicordoj de la lokfirmeco de subjekto, rekta objekto kaj prepozicia objekto estas tre malsamaj en la malsamaj tekstoj; estas sensece serĉi ĝeneralajn tendencojn kaj kaŭzojn.

La lokfirmeco de la frazofunkcioj en certa teksto, kompreneble, influas la gepatra lingvo de la aŭtoro(j). Tio montriĝas ĉefe en la revuoj. Kiel oni emus atendi, ĉiuj argumentoj krom la agento (pro la kurioza unika escepto en R1) estas pli lokfirmaj en R1 kaj R2 ol en R3 kaj R4. Kelkaj argumentoj estas pli lokfirmaj en R1 ol en R2, aliaj inverse, same por R3 kaj R4. Ĉar la diferencoj ne estas grandaj, estas neutile serĉi kaŭzojn.

Inter la tekstgenroj la poezio plej favoras malgrandan lokfirmeco de la argumentoj (malpli strikte: "liberan vortordon"). En V1 ĉiuj argumentoj estas malpli lokfirmaj ol en R3 kaj R4. En V2 la subjekto havas lokfirmeco 0.77 kontraŭ 0.77 en R3 kaj 0.76 en R4, do nur tre malgranda diferenco; ĉiuj aliaj argumentoj estas ankaŭ en V2 multe malpli lokfirmaj ol en R3 kaj R4. Do poezio de homoj kun gepatra lingvo kun ligita vortordo havas pli liberan vortordon ol prozo de homoj kun gepatra lingvo kun libera vortordo! Leviĝas la demando, kiom tio estas atribuenda al la postuloj de rimo kaj metriko.

Tiu faktoro efikas en ambaŭ tekstoj, sed estas multe malpli la sola kaŭzo en V1 ol en V2. V1 estas tre riĉa je inversioj ne atribueblaj al la versoformo, ekz. 15 inversioj ne klarigeblaj per la metriko nur en ĉapitro XIV.

Ekzemplo el alia ĉapitro:

la rokomuron tremigas kaj fendas inundoj (p. 53)

Tiaj frazoj, kvankam verkitaj de okcidenteŭropano, estas psikolingvistike tute analogaj al la frazo "La lagon nutras du fontoj" de la hungara turistgvidisto.

La vicordo de la tekstoj krom la poezio kaj la revuoj laŭ malkreskanta lokfirmeco de la argumentoj estas proksimume jene (ĉar en multaj kazoj el du tekstoj A kaj B unu argumento estas pli lokfirma en A kaj alia en B): N1 - P1 - S2 - N2, P2 - S1. En ĉiuj tekstoj la subjekto estas pli lokfirma ol en R3 kaj

R4. Ĉiuj argumentoj estas pli lokfirmaj en N1 ol en N2 kaj pli lokfirmaj en P1 ol en P2. En S1 la lokfirmeco de la subjekto estas 0.83 kontraŭ 0.82 en P2 kaj S2; ĉiuj aliaj argumentoj estas malpli lokfirmaj ol en ĉiuj aliaj tekstoj nerevuaj kaj nepoeziaj. Do la gepatra lingvo influas iom, sed la influon de tekstgenro kaj gepatra lingvo facile superregas stilaj kutimoj pure personaj.

La Plena Gramatiko notis emon meti pronomajn (=partiklajn) objektojn inter subjekton kaj predikaton. Tiu afero estas esplorinda por ĉiuj argumentoj.

Ke la partikleco favoras la interpozicion, signifas, ke por ĉiu frazofunkcio

$$A = \frac{\text{nombro da partiklaj frazelementoj inter subjekto kaj predikato}}{\text{nombro da frazelementoj inter subjekto kaj predikato}}$$
$$B = \frac{\text{nombro da partiklaj frazelementoj}}{\text{nombro da frazelementoj}}$$

Nur en unu kazo (la objekta predikativo en V1) $A < B$. Do la partikleco forte favoras la pozicion inter subjekto kaj predikato.

Vicordo de predikato, rekta objekto kaj objekta predikativo.

En 9 el la 12 tekstoj la ordinara vicordo estas predikato - objekto - predikativo; du, P2 kaj S2 havas pli da frazoj kun la vicordo objekto - predikato - predikativo kaj S1 havas tiom da frazoj kun la vicordoj predikato - objekto - predikativo kaj objekto - predikato - predikativo.

La tekstoj N1 kaj R1 havas pli da rektaj objektoj malantaŭ la prepoziciaj objektoj, ĉiuj aliaj pli da rektaj objektoj antaŭ la prepoziciaj objektoj.

Ne eblaj estas ĝeneralaj konkludoj koncerne la vicordon de la aliaj paroj de argumentoj.

Pozicio de la adjektoj kaj alparolataj personoj rilate al la bloko.

La rezultoj montras emon meti substantivajn, participajn, infinitivajn kaj subpropoziciajn adjektojn malantaŭ la blokon, kaj, se ne malantaŭ la blokon, prefere antaŭ la blokon. Por la partiklaj adjektoj la malpli ol ŝanca ofteco de la pozicio malantaŭ la bloko povas esti klarigita per la emo meti longajn klaŭzojn en la finon.

Oni emas meti la alparolatan personon antaŭ la blokon; nur en S1 la vera nombro da alparolataj personoj antaŭ la bloko (0) estas pli malgranda ol la ŝanca ofteco (1).

En la vokativaj tekstoj ne montriĝas ĝenerala tendenco meti la alparolatan personon pli ol laŭŝance en la komencon aŭ finon de frazo.

Ekzistas ĝenerala tendenco meti partiklajn adjektojn en la bloko prefere tuj antaŭ la predikaton. Tio ne estas atribuebla al la gepatraj lingvoj de la aŭtoroj: en S1 kaj R2 pli da partiklaj manieraj adjektoj staras tuj antaŭ la predikato ol tuj post ĝi, dum en la angla kaj franca lingvoj mem manieraj adjektoj staras post la predikato.

La dominantan pozicion en la frazo de adjekto de certa frazofunkcio kaj certa komplekseco determinas parte ĝia komplekseco, parte ĝia frazofunkcio.

Por la adjektoj manieraj kaj gradaj en la pli multaj tekstoj la partiklaj adjektoj staras plej ofte en la bloko tuj antaŭ la predikato, la nepartiklaj adjektoj malantaŭ la bloko. Tio estas konforma al la fakto, ke manieraj kaj gradaj adjektoj estas plej strikte ligitaj al la predikato.

La stataj adjektoj staras prefere malantaŭ la predikato.

En ĉiuj tekstoj la plimulto de ĉiuj celaj adjektoj staras malantaŭ la bloko.

La modalaj adjektoj staras plej ofte antaŭ la bloko en ĉiuj tekstoj. Logike modala adjekto estas predikato, kies argumento estas la frazkerno. Do frazo kun modala adjekto povas esti konsiderata kiel konsistanta el du frazelementoj: la modala adjekto kaj la tuta cetera frazo. Kutime la cetera frazo estas pli longa ol la modala adjekto; do oni emas meti la ceteran frazon en la finon konforme al la ĝenerala tendenco meti longajn frazelementojn en la finon kaj do la modalan adjekton en la komencon.

5.3. La influo de la voĉo

Ke la pasivo kun agento estas uzata por ŝanĝi la vicordon de logika subjekto, predikato kaj logika objekto, tion konfirmas la ekstrema malofteco en frazoj kun agentoj de devioj de la vicordo subjekto - predikato - agento (nur unu kazo en ĉiuj esploritaj tekstoj!).

La sama fakto klarigas ankaŭ la fakton, ke en ne malpli ol 5 tekstoj (V1, V2, N1, N2, P1) la pasivoj kun agentoj tute mankas. Inter ili estas "La infana raso", kiun multaj konsideras kiel la majstroverkon de la Esperanta literaturo, de Auld, en kies gepatra lingvo la pasivo estas tre ofta. Male, en neniu teksto tute mankas inversio de la objekto. En lingvo, en kiu ambaŭ estas eblaj,

el stila vidpunkto pasivo kun agento estas do multe pli bone malhavebla ol inversio de la objekto.

Sed la pasivo sen agento tute ne servis por ŝanĝi la vicordon inter predikato kaj logika objekto. Se ĝi havus tiun celon, oni emus atendi, ke la vicordo subjekto - predikato estas pli ofta por pasivaj predikatoj ol por aktivaj transitivaj.

En ĉiuj tekstoj krom V2 la aktivaj kaj pasivaj predikatoj estas pli lokfirmaj ol la medialaj kaj netransitivaj. Mi ne scias klarigon de tiu fakto.

En kelkaj tekstoj la aktivaj predikatoj estas pli lokfirmaj ol la pasivaj, en aliaj inverse. Same por medialaj kaj netransitivaj predikatoj. Tio malpruvas la hipotezon, ke la pasivo sen agento estas ĉefe uzata por ŝanĝi la vicordon inter predikato kaj logika objekto.

La vicordo de la tekstoj laŭ malkreskanta sombro da pasivaj predikatoj sombro da aktivaj predikatoj estas:

S2 - R1 - P2 - S1 - R3 - R2 - R4 - P1 - V1 - N2 - N1 - V2.

La vicordo de la tekstoj laŭ malkreskanta ofteco de la agentoj estas:
R1 - S1 - S2, R2 - R3 - P2 - R4 - V1, V2, N1, N2, P1 (la lastaj ĉiuj 0).

La vicordo de la tekstoj laŭ malkreskanta lokfirmeco de la rekta objekto estas:

N1 - P1, R2 - S2 - R1 - P2 - N2 - R4 - S1 - R3 - V2 - V1.

Konforme al la trovaĵoj de Svartvik (p.155) por la angla lingvo la pasivaj predikatoj, tiel tiuj kun agentoj kiel tiuj sen agentoj, estas plej oftaj en sciencaj publikaĵoj kaj plej maloftaj en noveloj (kaj poezio; tiun lastan tekstgenron Svartvik ne esploris). La ĉefa funkcio de la pasivo sen agento estas lasi la logikan subjekton nemenciita. Tial ĝia ofteco en sciencaj publikigaĵoj, kie ofte gravas nur la observoj kaj konkludoj, ne la esplorado.

Aliflanke, la lingvaĵo de poezio kaj noveloj estas konkreta, persona, ĝi pentras personajn travivaĵojn, kaj ĝuste tie oni ne ŝatas la senpersonecon de la pasivo. Krome en la poezio devigas al koncizeco la metriko, kaj la pasivo plilongigas la frazon.

Inter la revuoj tiu kun la malplej oftaj pasivoj kaj agentoj estas R4, kion oni povus atendi pro la ekstrema malofteco de la pasivo en la hungara lingvo mem.

Eĉ en la sama tekstgenro la ofteco de pasivoj kaj agentoj estas ne ĉiam pli granda en tekstoj de aŭtoroj kun ligita vortordo en la gepatra lingvo ol en tekstoj de aŭtoroj kun libera vortordo en la gepatra lingvo: la pasivoj estas pli oftaj en S2 ol en S1, en P2 ol en P1, en N2 ol en N1 (malgraŭ la fakto, ke en la hungara lingvo, la gepatra lingvo de la aŭtoro de N2, la pasivo preskaŭ mankas) kaj en R3 ol en R2, la agentoj pli oftaj en P2 ol en P1.

Ankaŭ ne ekzistas multa interdependeco inter la lokfirmeco de la rekta objekto kaj la ofteco de la pasivoj kaj agentoj. Nur la du poeziaj tekstoj havas samtempe malaltan lokfirmecon de la rekta objekto kaj malaltan oftecon de pasivoj kaj agentoj, sed tie ambaŭ formojn kaŭzas la poezia genro kaj ne unu la alian. Aliflanke ekz. en N1 kaj P1 la rekta objekto estas tre lokfirma kaj la pasivoj kaj agentoj tre maloftaj. Ne ekzistas pli/malpli konstanta bezono je inversioj, kiu montriĝas senpere en kelkaj tekstoj kaj maskita kiel pasivo kun agento en aliaj, sed la bezono je inversio de la logika objekto estas tre malsama ĉe malsamaj aŭtoroj.

5.4. La influo de la longo

Konforme al tio kion oni povus atendi surbaze de la trovaĵoj en etnaj lingvoj kun nur tri esceptoj en ĉiuj tekstoj kaj por ĉiuj kompleksecoj la meza longo de finaj frazelementoj estas pli granda ol tiu de la komencaj kaj mezaj.

Mi havis la supraĵan impreson de tendenco al pli granda meza longo por la nepartiklaj frazelementoj en la komenco ol en la mezo. Por substantivaj kaj infinitivaj frazelementoj tiu tendenco montriĝis ekzisti, por participaj kaj subpropoziciaj frazelementoj ne.

5.5. La influo de la determiniteco

La pozicio de la relativaj kaj demandaj frazelementoj.

Kiel oni povus atendi, en ĉiuj tekstoj la grandega plimulto de la relativaj kaj demandaj frazelementoj de ĉiuj frazofunkcioj staras frazkomence. La escepton de la predikato klarigas la fakto, ke relativaj kaj demandaj predikatoj estas ofte malkontinuaj.

Ekzistas ankaŭ devioj, eĉ stile tre interesaj, en V1, sed ili estus tro eksteremaj.

Remarkinde estas ankaŭ, ke en ĉiuj tekstoj relativaj kaj demandaj agentoj mankas tute. Tion kaŭzas sendube la ĝenerala malemo meti la agenton aliloke ol malantaŭ la predikaton.

La pozicio de la ĝeneralaj frazelementoj.

Montriĝis, ke la supozata tendenco meti ĝeneralajn frazelementojn aŭ en la komencon aŭ en la finon de la frazo, tute ne ekzistas.

La fakto, ke inter la tekstoj kun malpli ol ŝanca ofteco de komencaj ĝeneralaj frazelementoj estas unu de polo (S2), dum en la alia poldevena teksto (R3) la diferenco inter la vera kaj la ŝanca nombroj da komencaj ĝeneralaj frazelementoj estas ne tre granda, faras la aserton de Grappin jam menciitan - ke en la pola lingvo nenio, ĉio, neniam, ĉiam, tro staras preskaŭ ĉiam frazelementoj - por kiu li ne donas pruvon - eĉ tre duba por la pola lingvo mem. Se tio ne jam okazis, mi forte rekomendas al pola lingvisto testi tiun tezon per statistika esploro de tekstoj.

Pozicio en la frazo de frazelementoj de donita determiniteco.

En ĉiuj tekstoj la determinmezo estas pli granda por demandaj partiklaj frazelementoj ol por relativaj.

Por ĉiuj determinitecoj kaj en preskaŭ ĉiuj tekstoj la nepartiklaj (plej ofte substantivaj) frazelementoj tendencas al pli posta pozicio en la frazo ol la partiklaj. Pli ekzakte: en ĉiuj tekstoj kaj ĉiuj determinitecoj la determinmezo por la partiklaj frazelementoj < la determinmezo por la nepartiklaj frazelementoj (2 esceptoj inter 72 kazoj).

Por la partiklaj frazelementoj ne ekzistas ĝenerala tendenco al pli posta pozicio en la frazo por la nedeterminitaj ol por la determinitaj.

La determinmezo estas pli granda por la partiklaj ĝeneralaj frazelementoj ol por la partiklaj determinitaj kaj nedeterminitaj frazelementoj en 10 tekstoj. La determinmezo estas pli granda por la partiklaj adjektivaj frazelementoj ol por la partiklaj determinitaj kaj nedeterminitaj frazelementoj en ĉiuj 12 tekstoj. La determinmezo estas pli granda por la partiklaj adjektivaj frazelementoj ol por la partiklaj ĝeneralaj frazelementoj en 9 tekstoj kaj malpli grandaj en nur 3 tekstoj.

Por la nepartiklaj (plej ofte substantivaj) frazelementoj en ĉiuj tekstoj la determinmezo estas pli granda por la nedeterminitaj frazelementoj ol por la determinitaj. Tio estas konforma al la trovaĵoj de Svartvik, ke la subjektoj de pasivaj frazoj (starantaj en la komenco, aŭ almenaŭ antaŭ la agentoj) estas plej ofte determinitaj, kion li klarigas per la Funkcia Fraza Perspektivo.

Ne ekzistas ĝenerala tendenco por la pozicio de la nepartiklaj adjektivaj frazelementoj.

LITERATURO

- Auld, W., La infana raso, 2a eldono, La Laguna 1969
- Boulton, M., Eroj, La Laguna 1959
- Okuloj, La Laguna 1967
- The British Esperantist, januaro kaj februaro 1966
- Firbas, J., From comparative word-order studies, Brno Studies in English, Volumo 4, Prago 1965
- Grappin, H., Grammaire de la langue polonaise, Parizo 1963
- Gula, A., Elementaj Korpuskloj kaj la Strukturo de Materio el: Behrmann, H., La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj, Nürnberg 1967
- Hungara vivo, 1961/1
- Kalocsay, K. - Waringhien, G., Plena Gramatiko de Esperanto, 3a eldono, Milano, 1958 kaj 1964
- Lapenna, I., Elektitaj paroladoj kaj prelegoj, Rotterdam 1966
- Pola Esperantisto, 1968, 1/2
- El Popola Ĥinio, 1964/4
- Privat, E., Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado
- Svartvik, J., On Voice in the English Verb, Hago 1966
- Tompa, J., Ungarische Grammatik (Hungara gramatiko), Hago - Parizo 1968
- Verkuyl, H.J., Logische calculi en grammatische beschrijving, Algemeen Nederlands Tijdschrift voor Wijsbegeerte (Logikaj kalkuloj kaj gramatika priskribo, Ĝenerala Nederlanda Revuo por Filozofio), julio 1972
- Waringhien, G., Lingvo kaj vivo, La Laguna 1958

LA VICORDOJ DE LA FRAZELEMENTOJ EN ESPERANTO

(W.A.V. Themaat, Amsterdam, Nederlando)

Esperanto havas grandan liberecon de la vicordo de la frazelementoj. Mi esploris la faktorojn influantajn ilian vicordon per statistika analizo de tre diversaj tekstoj.

La versformo tre favoras deviojn de la standarda vortordo: du poeziaj tekstoj, ambaŭ de britoj, montriĝis havi pli oftajn deviojn de la standarda vortordo ol prozaj tekstoj de poloj kaj hungaroj.

La preferata pozicio de manieraj kaj gradaj adjektoj estas tuj antaŭ la predikato, tiu de modalaj adjektoj antaŭ subjekto kaj predikato.

La frazofunkcio plej strikte ligita al sia ordinara pozicio estas la agento, ĉar la pasivo kun agento estas uzata por ŝanĝi la vicordon de logika subjekto, predikato kaj logika objekto.

La pasivo sen agento ne estas uzata por ŝanĝi la vicordon de predikato kaj logika objekto. Ne ekzistas inversa korelato inter ofteco de inversio de la objekto kaj ofteco de la pasivo.

Finaj frazelementoj tendencas esti pli longaj ol komencaj kaj mezaj. Substantivaj kaj infinitivaj komencaj frazelementoj tendencas esti pli longaj ol mezaj.

Nedeterminitaj substantivaj frazelementoj tendencas havi pli postan pozicion en la frazo ol determinitaj.

Summary

WORD-ORDER OF SENTENCE-ELEMENTS IN ESPERANTO

(W.A.V. Themaat, Amsterdam, Nederlando)

Esperanto has a great liberty in the order of the parts of speech. I explored the factors influencing their order by statistical analyses of a great diversity of texts.

Poetry strongly favours deviations from the standard word order: two poetical texts, both of Britons, turned out to have more frequent deviations from the standard word order than prose texts of Poles and Hungarians.

The favourite position of adjuncts of manner and degree is immediately before the predicate, of modal adjuncts before subject and predicate.

The sentence function most strictly sticking to its ordinary position is the agent, without doubt because the passive with agent is almost always used to attain a certain serial order among logical subject, predicate and logical object.

The passive without agent is not used to change the order of predicate and logical object. There is no inverse correlation between frequency of inversion of the object and frequency of passive.

Final parts of speech tend to be longer than initial and central ones. Substantivic and infinitivic initial parts of speech tend to be longer than central ones.

Undetermined substantivic parts of speech tend to a later position in the sentence than determined ones.